

Informero 14B de la Germana Esperanto-Biblioteko pri novaĵoj en la reto

Ankaŭ interesa afero aktuala estas alia iniciato de Roland Rotsaert, kiu kolektis la malgrandajn fak-terminarojn, kiuj aperis en la duaj partoj de la jarlibroj de Internacia Esperanto-Ligo, poste UEA dum la jaroj 1940 ĝis 1961.

Ili nun estas troveblaj rete per adreso <http://goo.gl/XQwE4i>.
Temas pri

- *Aeronaŭtika Terminaro* de E. D. Durrant, p. 17-52 en 1941
- *Terminaro por Infan-ludoj* de Komitato de SBET, p. 14-40 en 1942
- *Radio-terminaro* de Alec Venture, p. 19-51 en 1943
- *Muzika terminaro* de Montagu C. Butler kaj Frank Merrick, p. 17-51 en 1944

- *Filatela Terminaro* de Herbert M. Scott, p. 35-60 en 1945
- *Leĝa terminaro* de A. Mildwurf, p. 44-51 en 1946
- *Kudra kaj trika terminaro* de Myrtle Verda kaj Vilĉjo Verda, p. 45-63 en 1947
- *Marista terminaro* de Peter Clissold, pt. 1: p. 28-59 en 1949 kaj pt. 2: p. 21-46 en 1950
- *Fervoja terminaro* de Edward M. Rosher, p. 35-69 en 1952 kaj daŭrigo: p. 39-67 en 1953
- *Matematika terminaro* en 1954
- *Gastronomia terminaro kaj fakterminaro por kelneroj kaj kuiristoj* en 1958
- *Ŝoseoj kaj pontoj* en 1959
- *Meteorologia terminaro* en 1961

Poste ne plu aperis tiaj terminaroj.

Ana Manero de la Madrida Biblioteko Juan Régulo Pérez prizorgas ankaŭ la retejon „bitoteko“, kiu ja liveras metadatenojn al la ambicia Eŭropa iniciato celanta krei grandan retan bibliotekon „kolekto Europeana“ www.europeana.eu/portal/search.html. Tiu bitoteko de la hispanoj ankaŭ uzeblas por trovi tiujn terminarojn: <http://goo.gl/3aMI04>

Tria trovloko estas la retejo „Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko STEB“, kiun prizorgas Szilvási László: www.eventoj.hu/steb/.

Utho Maier